

# HABIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORO:  
S-RO. MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

N.º 103  
Nov. - Dec. 1976


Str. Barrencale Barrena, 7 - 1.ª  
Telefono 416 44 92 - BILBAO-5



*Ke la fino estu gaja!*







## ENHAVO

Ĝis la! .....	2
Adiaŭ .....	2-3-4-5
1-a premio .....	5-6
Finfine! .....	7-8
Esperanto: nia kialo .....	9-10
Diversaĵoj .....	11
Ni apliku - .....	12-13-14
Lingve pri:- .....	15
Humoro .....	16

## "NOTO"

Tiu ĉi 103-a numero de HEJS-bulteno atingas vin malfrue, sed la kialo de tiu malfruigo, ja ŝuldiĝas nur al la kvanto de gravaj novaĵoj kiuj en la lastaj momentoj de l'jaro trafis la sekcion, kaj kiuj iel trudis la redaktoron prokrasti la aperigon de la revuo.

FELIĈAN NOVAN JARON

"MI DEFENDAS LA OKCIDENTAN KULTURON KAJ CIVILIZACION"  
MI RIPETAS: "MI DEFENDAS LA OKCIDENTAN KULTURON KAJ CIVILIZACION"  
MI RIPETAS...



# Ĝis la! ...

Printempe kaj aŭtune,  
subpluve kaj subsune,  
en frosto kaj en ardo,  
en fruo kaj en tardo,  
feliĉe kaj misorte,  
ĝisoste kaj ĝismorte,  
mi estas via adoranto  
Liber' kaj Esperanto!

EMBA

Kiam komence de la jaro (76), la prezidanto komisiis min por la redaktora laboro de nia revuo, mi kuraĝis aserti, ke miaj deklaroj estos nur miaj agoj, ĉiam konformaj al la regularo de nia sekcio. Nun, post unu jaro de laboro, en ja ne tro favoraj kondiĉoj, mi devas forlasi la postenon. Gaje sed triste mi foriras; tamen, mi ne diras "adiaŭ", sed nur "ĝis la!".

Tutkoran dankon al ĉiuj, kiuj iel kunlaboris en la tasko.

La redaktoro

## ADIAŬ

Finigis jaro. Normala afero, ĉu! Tio ĉi havas signifon esence nur banalan. Sed ne, ne nur jaro, sed tuta periodo de nia juna organizaĵo iĝis jam parto el la historio de la hispana esperantista movado.

Mi ne scias kiel komenci. Fakte, adiaŭoj estas ĉiam malfacilaj, des pli se oni longe kaj interespene okupiĝis pri la "afero".

Sendube, vi scias, ke dum la nuna jaro HEJS-estraro senlace serĉis posteulojn. Principe, tio estis postulata de nia intenco demisii plej malfrue fine de la jaro 76. Tiu intenco ja havas kialojn, ĉefe personajn, (baldaŭaj profesiaj taskoj); cetere mi ne estus prezidinta HEJS volonte dum la nuna jaro, ĉar la soldatservo preskaŭ tute nuligis mian eblecon labori por la sekcio.

Aliflanke, la nuna estraro, de mi proponita (laŭ la regularo) al la membroj, kvankam diversloka, plimulte loĝas en la sama urbo, Bilbao, kies grupo disponigas al ni sian sidejon. Bedaŭrinde, iom post iom malklariĝas la bildo pri la estonteco de la nuna sidejo de la bilbao'a grupo.

Ĉio ĉi nebligas la daŭrigadon de la plenumo de administrataj taskoj en Bilbao. Tial, starigis la demando: "Kie povos HEJS havi sidejon kun eblecoj de pluvivo?". Respondo: "Kie troviĝas la plimulto el la hispanaj esperantistoj, t.e., Katalunujo".

Nur per mallonga letero mi scias iomete pri la kontaktoj faritaj de la demisianta estraro. Ŝajne, la plej forta grupo el la tuta Hispanujo, Sabadell, kuraĝos pluteni la administradon de la organizaĵo. Kiel vi scias, HEJS naskiĝis tie. Kataluna pioniremo ĝin kreis, kaj kataluna laboremo ĝin pluvivigos, kaj, espereble, kreskigos.

Nomo de la prezidonto? Estas proponita s-ro LUDOVIKO DE YZAGUIRRE. Ja multaj el vi, ĉefe la katalunoj, konas lin. Li estas juna homo, pli juna ol la kadukiĝanta demisiinto. Lia aktivado estas travigla en ĉiuj kunvenoj kiujn li ĉeestas, ĉu por amuzi, komenti, starigi iniciatojn, ktp. Cetere, ne nur katalunoj konas lin, sed li iĝis antaŭnelonge internacia. Plurajn internaciajn kongresojn li ĉeestis, ne pasive, sed kun plena partopreno. Lia aktivado en TEJO, pli konkrete, en KER, reliefigas lian interesigon pri la prestiĝo de nia tegmenta

organizaĵo, kaj pri la kunagado de esperantistoj kaj homoj batalantaj kontraŭ lingva diskriminacio.

Eble, la estonta prezidanto ne estas tre konata de HEJS-membraro. Efektive, li ne multe laboris por -HEJS- kompare al la aliaj poresperantaj taskoj kiujn li entreprenis. Tio ĉi ne ŝuldiĝas al neglektemo, sed -mi konjektas- al malsameco de kriterioj kun la nuna estraro kaj mi pri tio, kio HEJS devas esti esence.

Mi devas, plue, konjekti, ke la plimulto el liaj estontaj kunlaborantoj troviĝos necese, en lia geografia proksimeco; tie troviĝas multaj junaj esperantistoj, kies ideojn rilate Esperanton, ĝian disvastigon kaj la rolon de la esperanta movado en la nuntempa socio akordas al la liaj.

Rigardo malantaŭen, al la pasinteco, utilas nur cele al pristudo de eraraj kaj ĝustaj vojoj por la estonteco. Tiuj ĉi lastaj jaroj, kiam la sidejo troviĝis en Bilbao, havis du periodojn. La unua celis reviviĝon de fantoma organizaĵo preskaŭ sen membroj, kapitalo kaj gvidantoj. La dua, surbaze de la atingita fortikeco, konsistis en interna strukturado, kiu ŝajnis la Sektion pli vigla. La laŭdoj, kiujn nia bulteno ricevis, la kunvoko de HEJS-tendaroj, la forta reprezentiĝo en TEJO-komitato, la ĵus ricevita premio de "Fundación Esperanto" estas signoj de parta sukceso.

Tamen, tiuj ĉi sukcesoj nenion atingis en direkto al la diskonigo de Esperanto inter ĝenerala publiko, aŭ, pli ĝuste, inter la junularo. Resume, ni ne atingis eliri el niaj vicoj, kiel bedaŭrinde okazas al multaj movadaj organizaĵoj.

Kelkaj aktivuloj laboradis serioze dum, la plimulto el la membraro restis inerta, kiel simpla ricevanto de bulteno. Alia malgranda parto el la membraro -mi estas certa- konsistis el homoj pretaj labori por Esperanto en formo tre diverĝa al tiu de la lastaj estraroj. Ili ne vidis lokon por si en la laŭ ili tro burokrata organizaĵo.

Ne, malgraŭ la atingoj, tiu ĉi vojo ne estis tute ĝusta. Finfine aperis homoj kiuj deziras gvidi la organizaĵon. Iliaj ideoj estas, en kelkaj temoj, tute malaj al la niaj, aŭ, almenaŭ, la miaj. Nu, kondiĉe ke ni neniam deflankiĝu de la postulo pri neŭtraleco deklarita en nia regularo, ek al la nova vojo!.

Restas al mi danki ĉiujn, sen kies kunlaboro neniu el niaj atingoj estus fakta. Mi petas al vi ke nun via apogo estu des pli granda por la nova teamo, kiu kun iluzio pretas gvidi HEJS-on, laŭ alia vojo -mi opinias-, al la dezirata celo.

Ĝis ĉiam!

Miguel Angel Altuna

# **1<sup>a</sup> PREMIO**

## **«FUNDACION**

### **ESPERANTO»**

#### **POR „HEJS”**

"Ĉijare la FUNDACION ESPERANTO aljuĝis sian premiojn al sekcioj kaj E-grupoj, laŭ difinita studo.

HEJS, gajnis la unuan (1-an) premion FUNDACION ESPERANTO pro sia kultura laboro dum la jaro 1975."

Tiel simple sed mirinde oni komunikis al ni la aljuĝon de la premio, kiun oni transdonis al ni okaze de la ĉijara festo de Zamenhof en la grupo de Bilbao.

Pri la premio tutcerte ĉiuj demandos sin el

kio ĝi konsistas. Nu, ni klarigu ke la premio konsistas el kvinmil (5.000) pesetoj kaj diplomo.

La unua novaĵo pri la afero atingis nin pere de s-ro Juanes, komisiita de la "FUNDACION ESPERANTO" por transdoni al ni la premion. Ja kvinmil pesetoj ne estas la mirnda solvo (kiam temas pri mono) kiun bezonas la HEJS-kason; tamen, tiuj kvin verdaj biletoj estas bonega injektaĵo por ĝi. Eble oni pensas ke la mono estas la plej pozitiva parto de la afero, sed ni ne estu blindaj, kvankam mono estas vere "nepra" bezono por kiu ajn organizo, ĉu esperanta aŭ ne; por ni, por la tuta HEJS-estraro kaj, mi supozas ke, ankaŭ por ĉiuj HEJS-anoj, tio, kio vere gravas, estas la senco kiun enfermas en si la aljuĝo de la premio al nia sekcio. Ni, la tuta estraro, kiu ĉiam laboris, pli aŭ malpli bone sed tutkore, nun estas ĝoja, tre ĝoja, ĝojega.

#### IOM PRI LA PREMIO

Eble multaj miros pro la neanonco de l'konkurso en "Boletín", organo de HEF, kies prezidanto estas samtempe tiu de la patronaro "FUNDACION ESPERANTO", sed oni ne tro miru ĉar la aferon ni klarigos: Okazas ke la kutima premio de la fondaĵo estas por literatura konkurso, kiu ĉijare devis esti nuligita de la estraro de l'fondaĵo ĉar la koncerna respondeculo de "Boletín", kiu devos ĝin anonci pere de la HEF-organon, perdis la alvokon sendita de la sekretario de la fondaĵo. Tial la estraro de la FUNDACION ESPERANTO decidis ĉijare aljuĝi la premion al sekcioj aŭ grupoj de la Hispana Esperanto-Federacio kiuj plej bonan kulturan laboron prezentis laŭ la raportoj aŭ komentoj aperintaj en Boletín kaj ceteraj revuoj en 1975.

Ni gratulas al Centro de Esperanto Sabadell kaj al la grupo Fido kaj Espero de Valladolid, kiuj kune atingis la duan premion de la fondaĵo.



⇒ **finfine!** ⇐

# HEJS: de BILBAO al SABADELL

HEJS plu vivos!!! Jes, finfine la diversaj kontaktoj de la estraro, atingis sukceson. Jam en novembro oni ricevis iun reagon el Katalunio; jen la teksto de la komuniko:

Kunvenintaj en Barcelono la 76.11.05an, reprezentantoj el diversaj katalunaj grupoj, valoris

Unue : ke per la kunfandiĝo de ĉies fortoj ni povus elteni HEJS-taskon.

Due : kunordiĝi por tiu ĉi tasko kaj eventuale aliaj.

Trie : adaptigi HEJS-on laŭ pli taŭga organizado al nunaj sociaj kondiĉoj.

Kvare: Nomumi la jenan provizoran estraron:

Prezidanto.- Ludoviko de Yzaguirre  
Pare Claret 446 4<sup>a</sup> - 4<sup>a</sup>  
Barcelona

Vicprezidanto.- Silvia Martinez  
Bonavista 163 b  
Sabadell

Sekretario.- Maria Jesus Molina  
Madaleta 30 b  
Sabadell

Kasisto:- Josep Cara  
Gambus 44 3<sup>a</sup> - 2<sup>a</sup>  
Sabadell

Kvine: starigi "aktivan delegit-reton", por kio jam de nun ni atendas sugestojn kaj proponojn de Eŭzkadio, Galegio, Kastilio, Valencilando kaj ceteraj regionoj.

Provizora estraro

Postaj pertelefonaj kontaktoj kun la estonta prezidanto pliklarigis la "situacion" laŭ jenaj punktoj:

- a) la HEJS-sidejo troviĝos (fakte jam troviĝas) en Sabadell. Jen la adreso:

HEJS  
General Mola 99  
Sabadell

- b) oni konfirmas la prezidantecon de sinjoro LUDOVIKO DE YZAGUIRRE, kies adreso troviĝas jam ĉi-supre.
- c) la nova HEJS-redaktoro estos (as) sinjoro OSCAR PUIG, kies adreso, al kiu ĉiuj povas jam sendi ĉiaspecajn kontribuojn por la HEJS-revuo, estas:

Güel y Ferrer 223  
Sabadell

Do, nur restas peti ke de nun ĉiuj apogu la novan HEJS-estraron same kiel antaŭe oni apogis la forpasintan.



## Don QUIJOTE

La plej monde konata verko hispana, kiu hontinde por ni, hispanoj ankoraŭ ne estas eldonata en Esperanto.

ATENTU ĈAR...

HEJS ĵus malfermis konton ene de "FUNDACION ESPERANTO" por la eldono de la verko de Cervantes. Vi kiu estas samtempe hispano kaj esperantisto, "NEPRE" devas kontribui. Do, sendu tuj vian kontribuojn al FUNDACION ESPERANTO Paseo Marina Moreno 35 - 4 drch. Zaragoza.

EN ESPERANTO

## HEJS: ESPERANTO ESTAS NIA KIALO

Dum la lastaj ses jaroj la HEJS-sidejo estis en Bilbao; nunjare nova stabo estas preta prizorgi la plej baldaŭan estontecon de nia sekcio, la jaron 1977. Tiuj nuraj ses jaroj signis tutan epokon de la vivo de la hispana junularo aganta favore al Esperanto, kies kulmino estis la laste ricevita premio de la "FUNDACION ESPERANTO".

Laŭlonge de tiuj jaroj, en kiuj pluraj estraroj kaj prezidantoj gvidis HEJS-on, mencioj kaj laŭdoj pli kaj pli oftigis -nun mi rememoras tiujn de "Esperanto", "Boletín", "Horizonto", kaj aliaj en nov-zelandaj kaj hungaraj kaj jugoslavaj revuoj "Koncize", ktp. - kaj la sekcio atingis senprecedentajn pintojn.

Nu, ĉio ĉi devas esti kuraĝilo por la novaj alvenintoj al HEJS-gvidado. Ili trovas jam vojon, laŭŝajne ne nur sekvinda, sed ankaŭ sekvida. La apogo ricevita estis tia, ne nur pro la laboro, sed precipe pro la ideologio kiu superregis ĉiajn sekciajn agadojn. Nun kiam la politika scenejo malfermiĝas por ĉiuj la hispanoj, HEJS devus sekvi tiun adekvatan agadvojon, kiu kontentigos ĉiujn. "HEJS" devus resti kiel NEUTRALA ORGANIZO, ĉar ĉiu, kiu volas agi politike havas jam plej larĝajn agadkampojn ene de la plej diversaj partioj. Esperanto kaj HEJS estas en si mem politikaj, laŭ la plena senco de tiu vorto; tamen, HEJS devus disvolvi tiun politikon kiu ĝin koncernas. La uzo kaj disvastigo de Esperanto estas sufiĉe vasta agadkampo kie HEJS-agantoj povos politikumi; tamen neniu devas forgesi ke HEJS estas POR-ESPERANTA organizo, kvankam ĝi agas ankaŭ Per Esperanto. La disvastigo de la zamenhofa lingvo estas Por-esperanta agado, sed por pruvi la utilecon kaj facilecon de nia lingvo, oni devas tion fari laborante pere de ĝi en prestiĝdonaj aferoj (ĉiaspecaj formoj de la kulturo, scienco, ktp.)

Nun, kiam oni adiaŭas tiun epokon, nia plej sincera deziro kaj espero estas ke la nova gvidantaro daŭrigu tiun sukcesan vojon atingante pli altajn pintojn kaj plibonigante ankoraŭ la "HEJS-organon" laŭ revua linio.

Juan Azcuenaga

## DEZIRAS KORESPONDI

Silvana Deak (17)  
Gimnazija  
58350 Methović  
Jugoslavio

Đina Perkov (18)  
Mostarska - 31  
59000 Šibenik  
Jugoslavio

Paolo Cerretini (22)  
via S. Giusto 14  
I-56100 Pisa  
Italio


Irena Głuch (15)  
Łaki 78  
PL-08-404 Gorzno  
Pollando

### ATENTON!


Amikoj kiuj deziras scii pri la problemo de la eks-hispana Saharo, skribu al: "AMIKA ASOCIO DE LA SAHARA POPOLO"

Viera y Clavijo n-o 34 - 30 H  
Las Palmas (Canarias) Hispanio

Ni ricevas demandojn de helpado. Al tiu, kiu sendos donace librojn, vestaĵojn, aŭ alion, ni liveros reciproke revuojn, poŝtmarkojn, ktp.



17%



En 1976 estis enskribitaj en lernejoj de Galegio nur "deksep" procentoj (17%) de la infanoj, dum en la resto de Hispanio, tiuj, kiuj troviĝis enskribitaj, estis tridek unu procentoj (31%); laŭ deklaro de s-ro José Paz Rodrigez, pedagogo kaj profesoro de l'universitata lernejo de ĝenerala baza edukado.

## LA KATALUNA L. : OFICIALA!

La kataluna lingvo estos, kune kun la kastilia, oficiala lingvo de Katalunio, laŭ la deklaro farita de la hispana prezidanto s-ro Suarez.

Jam de nun estas permesataj, laŭ oficiala ordono, la uzo de la propraj nomoj en regionaj lingvoj; kaj dum radiostacioj elsendas katalune eŭzkere, aperas, senĉese, libroj kaj revuoj en la kataluna kaj eŭzkera lingvoj, dum la galega komecas vekiĝi kaj jam posedas unu revuon --Teima--kaj oni reeldonas librojn antaŭlonge elĉerpitaj.

Finfine, ĉiu "hispano" povos paroli libere sian propran lingvon.

## PRI NIA 100-a REVUO

En nia 100-a numero "aperis" kelkaj eraroj. Ekzemple, en la rubriko "Eltiraĵoj propraj kaj aliaj aĵoj", la redaktado de la unua novaĵo estas misa, ĉar kie diras "ekspozicion DE altvaloraj" devus diri "ekspozicion KUN altvaloraj". Ankaŭ aperas fusaĵoj, kiuj estas vere "ĝenaj" ĉar ili ŝajnas ja gramatikaj eraroj; ni citu: sur la 19-a paĝo, kie diras "En sia imago" kaj "norma Londono" devus diri "En lia imago" kaj "morna Londono".

Ni esperas ĉies komprenemon. Dankon!

# NĪ APLĪKU LA TEKNĪKON

## EN LA SPORTON

Oni diras, ke la tekniko estas la patrino de la progreso, kvankam ofte mi ne scias ĉu ni progresas aŭ regresas. Sed ne estas mia intenco analizi tiun polemikan vidpunkton.

Mia hodiaŭa tasko estas prezenti al vi, karaj geamikoj, mian projekton surbaze de: kial ne apliki la teknikon en la sporton?

Vi jam scias, ke kiam oni parolas pri sporto preskaŭ ĉiam nia penso flugas al la reĝo de la sportoj, kiu fakte estas la futbalo.

Nu, mi legis en la ĵurnaloj, ke eble devige oni metos barojn en la hispanaj futbalejoj. Kia teruraĵo, patrino mia!! Pro diversaj kaŭzoj mi ĉeestas nenium futbalmatĉon, sed mi imagas kiom oni suferus se inter la spektanto kaj liaj idoloj oni metus barilon, kiu malhelpus, se ne la vidaĵon, jes tiun reciprokan kaj sekretan instinkton de kunhelpado ekzistanta inter la ludanto kaj la spektanto. La afero estas grava ĉar ĝi tuŝas la privatan personecon de ĉiu.

Mia intenco hodiaŭ estas alporti solvon al tiu serioza problemo, surbaze de la tekniko. Mia projekto dividiĝas en du partojn. La unua parto temas pri la ludtereno, la alia pri la futballudantoj.

Por la unua punkto mi pensas, ke oni povus meti surtere specialan reton el elektronikaj fadenoj, kiuj funkcias alkroĉitaj al iu komputero, kiu siavice povus troviĝi en ... ne gravas kia loko, eble eĉ en la Nacia Sporta Delegaciejo. Tamen en iu turo staranta en kiu ajn loko de la futbalejo kaj videbla de ĉiu spektanto devus ekzisti -ia ŝranko aŭ kadro kun diversaj kolorlumoj. Mi klarigos ĉi tion; tiu speciala reto el subteraj fadenoj devus esti instalita tiamaniere, ke kiam la pilko falus, por ekzemplo, en la

pun-areon, en la kadro de la turo aperus ruĝo lumo; kiam la pilko falus, en la gollinion, en la menciita lumaro de la turo povus ekfunkcii verda lumo (tiujn kolorojn mi elektis hazarde), kaj sekvante ĉi tiun sistemon, ĉiu parto kaj linio de la ludtereno havus sian propran lumon.

La avantaĝoj de ĉi tiu sistemo estus ege rimarkindaj, la diskutoj kaj disputoj, kiuj ofte okazas pro tio ke ne ĉiam oni scias ekzakte kaj ĝuste kien falis la pilko, ne plu ekzistus, ĉar ja la komputero estus favora al neniu, ĉiu spektanto restus trankvila kaj la krientaj fanatikuloj plu ĝenus nenium.

La dua parto, kiu ankaŭ estas tre tikla, temas



pri kontrolo de la ludanto kaj lia menso. Ĉiu futbalisto devus kunporti en iu loko de sia vesto, malgrandan -elektronikan aparaton-, kiu evidentigus la agojn de sia posedanto. Por ekzemplo, se iu ludanto piedbatas alian tutintence, en la jam menciita lumaro de la turo devus ekfunkcii difinita lumo. Se la piedbato ne estis intenca, tiam devus tion anonci alia specifika lumo.

La avantaĝoj, kiujn oni povus eltiri aplikante ĉi tiun teknikan sistemon, estas kompreneblaj por ĉiu homo. La paco regus inter la kunludantoj, estos malpli da vundintoj, kaj eĉ ne estus tiel necesa tiu -mirakla akvo.

Estas evidente ke al ĉi tiu projekto ankoraŭ mankas multaj kaj gravaj detaloj, sed la fundamenta ideo estas bone esprimita ĉi tie. Mi ja ne volas pli detale raporti, ĉar ĉi tiu artikolo fariĝus tro longa kaj ne restus spaco por la aliaj kunlaborantoj. Ankaŭ estas evidente, ke adoptante ĉi tiun revolucionan projekton tiuj timigaj bariloj ne estus bezonataj, ĉar ĉiu rigardanto plene fidus al la senpartia komputero. Amikeco kaj kamaradeco regus inter la publiko kaj krome oni ekzakte sciis kiu teamo estas la plej bona. Ne estus fuŝaj ludajoj kaj ludantoj kun malbonaj intencoj ne povus agi. Resume, vere oni ĝuos la sporton.

Eble ankoraŭ restas du punktoj pri kiuj mi devas doni iun klarigon. Unu el ili estas, kiamaniere instali tiun fadenreton kaj ceterajn elektronikajn aparatojn? Mi pensas, ke ĉi tio ne estas aŭ estos problemo, mi mem ne estas fakulo en tiu fako de la tekniko, sed mi imagas, ke ni homoj, kiuj kapablis atingi la lunon, nepre devas esti pretaj kaj kapablaj solvi niajn terajn problemojn, ĉu ne?

La alia punkto, kiun mi devas klarigi estas pri la arbitraciisto kaj liaj helpantoj. Post legado de ĉi tiu projekto vi venos al la konkludo, ke la arbitraciisto kaj liaj helpantoj ne plu estos bezonataj (ĉar ĉio estos efike kontrolata de la komputero), tamen ne estas mia intenco senokupigi tiujn sinjorojn. Post konvena kurso pri elektroniko, mi proponas ke ili okupiĝu pri la funkciado de la diversaj elektronikaj aparatoj, ĉu bone?

Eble multaj homoj opinios, ke per tiu sistemo la futbalistoj estos simplaj robotoj, sed mi demandas, kio estas vi, kara edziĝinta amiko, kiam via edzino diras al vi -lulu la infanon aŭ purigu la teleorojn?

LUIS SERRANO PEREZ

HEJS  
General Mola 99  
Sabadell



## Lingve pri : "Mirinda"

Ĉi tiun kompatindan vorton de certa flanko trafas akraj atakoj delonge. Mi volas defendi ĝin iomete.


Ni allasu, ke MIRINDA ne estas tute logike farita. Sed, ni konfesu, ĉi tiu mallogikeco tute ne malhelpis ĝin vivi. Jes, ĝi vivas de kiam ekzistas nia lingvo. Ĝinekstermi estus vere mortigo de plenkreskulo.

Kaj, malgraŭ sia mallogikeco, ĝi havas bone difinitan signifon. Ĝi identas nek je MIRIGA, nek je ADMIRINDA, ĝi staras ie meze inter ĉi tiuj du vortoj. Kaj ĝuste tio estas ĝia granda avantaĝo: kiam oni devus heziti inter MIRIGA kaj ADMIRINDA, oni ĉiam povas uzi la vorton MIRINDA. MIRIGA restas por la okazoj, kiam speciale ni volas akcenti la MIRON pri io, ADMirinda restas por la okazoj, kiam speciale ni volas glori kaj laŭdi.

Tiu ĉi uzmaniero tiel enradikiĝis, ke, se mi trovas anstataŭ MIRINDA la vorton ADMIRINDA, mi estas ĝenata pro la TROECO de la esprimo. Kaj se mi trovas anstataŭ ĝi MIRIGAN, mi estas ĝenata pro la nesufiĉeco de la esprimo. Mia lingva sento kaj alku-timiĝo POSTULAS la vorton MIRINDA spite al ĉia logiko.

Jes. La vivkapablo kaj neekstermebleco de MIRINDA estas klara ekzemplo pri la Zamenhofa diro, ke lingvo ne estas matematiko.



(El Kálmán KALOCSAY: "Lingvo Stilo Formo")



EL "MAFALDA"

# HUMORO

## HODIAŪA HISTORIO



SE FRATO LO BŌ - TAO  
MAJ ATIKUS BUKIS